1-a Jaro, N-o 29 APERAS S.A.T. SEMAJNE 16. Aprilo 1925

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

Redaktoro: N. BARTHELMESS Colmstrasse 1, Leipzig-Stötteritz | Gvidanto: E. LANTY 24, Boulevard Beaumarchais, Paris XI. | Administranto: R. LERCHNER Colmstrasse 1, Leipzig-Stötteritz

Nova milito prepariĝas

Letero el Rumanio

Mallonge mi volas doni klaran bildon pri Rumanlando, kie, sub plej mizera ekonomia stato, sub plej terura kaj vandala diktaturo vivas laboristaro kaj vilaĝanaro.

Rumanio venkis dum la mondmilito, triobliĝis ĝia teritorio, loĝantaro fariĝis 16 milionoj. Jam ĉe la komenco de sia regado en la jaro 1919, armeo rumana venkis la gloran Soveton en Hungario, kaj poste en la tuta lando, precipe en la novaj provincoj oni enkondukis diktaturon sub sieĝa stato (kiu ankaŭ nun regas) kontraŭ laboristaro kaj vilaĝanaro, kiuj postulante plugejon kaj domon ekribelis. Nun jam 3 jarojn regas burĝa-liberala registaro, sub kies daŭro ekonomia stato de l'lando tutplene ruiniĝis.

Kapitalista produktado ne povas reviviĝi. Petrolkampoj, karbo- kaj aliaj metalminejoj, fabrikoj, unuvorte ĉiuj naturfortoj naciigitaj estas, tio estas, ĉio estas koncentrigita en la mano de l'registaro. Pro tio, la interesoj de l'fremda kapitalo endanĝeriĝis. Internaciaj konfliktoj sekvas unu post la alia. Mono pro deflacia politiko mankas. Produktado kvazaŭ malestas. Registaro, reĝo kun reĝino vizitas eksterlandon por gajni prunteprenon, sed vane, fremda kapitalo ne envenas la landon pro la politiko egoisma de l'registaro. Usona, Japana ambasadoro forlasis la landon. —

Ĉiu riĉajo en la lando ruiniĝas. Ŝtata fervojo malbone funkcias, grandegaj kunpuŝiĝoj ĉiutagaj estas. Laste militvagonaro estis en vico, multaj mortintoj. Fabrikoj precipe en provincoj malfunkcias. En ŝtata administrado anarkio, milionaj ŝteloj. La lando estas sen greno, sen pano. Ĉiutage aperas registarleĝoj, ordonoj por subteni faŝistan regadon, leĝoj kontraŭ proletariaro-vilaĝanaro. Aperis la maizpano-ordono. Muelejojn okupis armeo, estas maizpanaj tagoj oficialaj, en aliaj tagoj nigra pano, same kiel dum la mondmilito. La kaŭzon mem la registaro donis, ĉar granda kvanto estis eksportita. Grandposedantoj kaj muelistoj pezajn orojn oferis al la registaro por eksportpermeso. Kaj nun la malriĉularo sen pano!

Aŭtoritataro trompis kamparanojn, ĉar ĝi forŝtelis la plugejojn por ili destinitajn. Vilaĝanaro ribeliĝas. Laboristaro same sub grandega teruro ĝemas; salajro subpremata, 10—12 laborhoroj, senlaboreco, strikoj, persekutado, arestado postsekvas unu la alian.

Burĝaro baziĝas sur grandegaj terurkaj perfort-organizajoj. Miliardaj impostoj metitaj sur malriĉularo subtenas ilin. Burĝaro sangan diktaturon aplikas kontraŭ laboristaro pro ekspluatado. Armeo, ĝendarmaro, policistaro, detektivaro estas en neimagebla nombro!

Nur en Besarabio estas 45000 ĝendarmoj krom armeo, kiuj en kamparana sango diktaturas. Tiea vilaĝanaro kaj laboristaro suferegas sub armiloj kapitalistaj. Besarabio apartenis al Rusio, sed post la mondmilito la Grandpotencoj (Francio, Britio, Japanio kaj Italio) donis ĝin al Rumanio.

Sed, por definitiva enkorpiĝo ĝi bezonas tri subskribojn, kiun nur Anglio kaj Francio plenumis, ne Japanio kaj Italio, kiuj pro lerta diplomatio de l'Sovetoj estas manligataj. Do Besarabio estas sub cindra ardajo en la ekstera politiko de Rumanio.

Pasintjare fondiĝis en Sovetukrainio sur la maldekstra bordo de l'Nistro (Dnjestro) Sovet-Moldavio Rumana. Kelkaj besarabiaj vilaĝoj aliĝis al ĝi. Venĝo sekvis post 6 tagoj. Besarabiaj vilaĝoj estis bombardataj ĝis ternivelo. Eĉ unu domo ne restis. Fajro detruis ĉion. 1000 vilaĝanoj, viroj, virinoj, infanoj mortis, 600 arestitaj. Burĝaro kruele forpremas la volon de l'malriĉularo por liberiĝo.

En armeo troviĝas kiel eble pleja mizero, batado, malsato, sed malgraŭ ĉio-tio senbrida prepariĝo por nova milito. Burĝaro novan militon antaŭvidas. Burĝaj jurnaloj fantomumas pri novaj militoj, skribas pri militinstrumentoj, pri gasoj mortigaj. Miliardoj vagadas eksterlanden, al Anglio, Francio — por militmaterialo. Nur por aeroplanoj 800 milionoj! En la lando militfabrikejoj konstruiĝas! Burĝaro defendas perforte siajn interesojn. Burĝaro prepariĝas kontraŭ Sovet-Rusio!!

Kompartio estas mallegala, ĝiaj anoj persekutataj, eĉ mortpafataj! Ĉiu movado subpremata! — En monato decembro kompartio murplakate manifestis kontraŭ burĝaro, kontraŭ mallaboreco, teruro, kontraŭ besarabia infero. Persekuto ĝis nun ne konita sekvis. 600 gekamaradojn de 12—75 jaroj oni arestis, patrinon kun suĉinfano. Turmentadoj de l'"Siguranca" (politik-policistaro) fariĝis famaj kaj timigaj. Precipe en Transilvanio, urbo *Arad*, 120 gekamaradoj ĝismorte estis batitaj!

Bastonoj po centoj estis, ĝis kiam ĉiuj rompiĝis, batoj sur plandon, sur orelon, dorson ĝis kiam korpo nigriĝis, fingroj en premiloj, uzo de l'elektra fluo ĝis freneziĝo, kelkaj tranĉis vejnon sur la

mano! — Poste sekvis malsat- kaj soifstrikoj kiel unikaj armiloj por liberiĝo, en la fama kaj terurplena politikfortikaĵa karcero subtera *Jilava*. Ĉi-tieaj strikoj atingis 32—37 tagojn, el kiuj 8—12 soifaj!

Ankoraŭ enkarcerigitaj estas 50 kamaradoj, kiuj scios kun la eksteraj, liberaj laboristoj la vojon por liberiĝo! *SAT-ano.*

Ferdinand Lasalle

La 11. aprilo 1825 naskiĝis en Breslau unu el la gloraj militintoj por socialismo: Ferdinand Lasalle. Ŝajnis al ni tute inde dediĉi pro tio kelkajn liniojn, tute ne multajn, al lia persono kaj verko, des pli ke, eble, iuj k-doj ne konis ilin.

F. Lasalle aperis al mondo en la familio de sufiĉe bonstata silk-negocisto. De l' juneco mem Lasalle elmontras iujn talentojn, akravidecon kaj obstinon, maloftajn por tiu aĝo. En gimnazio, dekkvin-jaraĝe, li skribas taglibron (eld. 1891), el kiu estas videble ke en 1840 lin jam entuziasmigas revoluciaj ideoj. "De 1840 mi estas socialisto" skribas li poste al Marx. Lasalle studas filologion, poste historion, filozofion. Li veturas pro siaj laboroj jen Berlin'on, jen Paris'on, kie li konatiĝas kun la fama poeto Heinrich Heine. Retroveninte Germanion Lasalle fordonas siajn fortojn por la defendo en eksedziga proceso de grafino von-Hazfeld kontraŭ ŝia edzo, plej riĉa kaj potenca feŭdulo.

Kompreneble, la proceso havis neniun revolucian bazon. Tamen la afero iam alpreninta estis iun revolucian spiriton: la batalo kontraŭ la grafo estis iomete batalo kontraŭ la tuta despotema kaj privilegiita feŭdularo. La proces-klopodoj sekvigis por Lasalle multajn malagrablaĵojn, sed ili plilarĝigis liajn sciojn, precipe jurajn, pliardigis lian parolon. Ili faris el li unu el la eminentaj oratoroj de l' epoko.

Lasalle estas en Düsseldorf dum revolucio de 1848. Tie li partoprenas organizon de milico kaj, unuafoje, enpaŝas politikan agadon. Li verkas adresojn al la Nacia Kunveno, alvokas la popolon al armiĝo. Li estas arestita kaj juĝata (v. "Kriminalproceso de Lasalle") 1849 en Düsseldorf de jurint-juĝantaro. Tie, la 3. majo, li prononcas faman "Parolon antaŭ la jurint-juĝantaro" (eldonita broŝure), kie li plendas por la rajto de l'popolo kontraŭstari atencojn kontraŭ la konstitucio.

En 1857 li transloĝiĝas Berlin'on kaj 1858 aperigas scienc-verkon, komencitan 14 jarojn antaŭe: "La Filozofio de Heraklito Efes'a", kiu kreas al la aŭtoro famon en la scienc. rondoj kaj el kiu bone evidentiĝas la socialistaj opinioj de l'aŭtoro.

La epoko, kiam Lasalle alveturis Berlin'on, estis ero de plivigliĝo de l' burĝa liberalismo. Lasalle kontraŭbatalas la reakciemon de l' registaro kun la apogantaj ĝin konservatoroj kaj aliflanke la burĝojn sin nomantajn "progresemuloj".

Li verkas vicon da broŝuroj: "La Italia milito kaj la tasko de Prusio", per kiu li pruvas la neceson helpi la naci-liberiĝon de l'italianoj; en "Sistemo de akiritaj rajtoj" li batalas kontraŭ la privilegiecoj de l' nobelaro kaj penas pruvi jure pravecon de revoluciaj leĝ-ŝanĝoj. Li verkas dramon "Franz von-Siekingen", revolucian laŭ enhavo, sed teknike iomete malfortan, kaj polemikaĵon: "Julian Smidt, historiisto por literaturo. Eldono kun rimarkoj de la kompostisto". Tri prelegoj, faritaj de li



Ferdinand Lasalle

por laboristoj "La Filozofio de Fichte", "Pri esenco de la konstitucio" kaj "Programo de la Laboruloj" (Pri speciala ligiteco de l' moderna historia periodo kun la ideo de l' laboristaro) aperis broŝurforme kaj ĝis hodiaŭ konservis sufiĉan parton de sia aktualeco. Precipe la broŝuroj "La Programo . . ." kaj "Pri esenco de konstitucio "(ekzistas esp. lingva leginda trad.) estas ankaŭ nun tre larĝe disvastigataj. La publikigo de "La Programo . ." elvokis sekvestron de l' eldonaĵo kaj la areston kaj juĝon de l' aŭtoro.

Ĉe la juĝo Lasalle prononcas neforgeseblan parolon ("La Scienco kaj la laboruloj"). Tamen li estas kondamnita je 4 monatoj de malliberigo. Tiam li skribas apelaciaĵon, kie li defendas la pravecon de siaj ekonomiaj tezoj (presite: "La maldirektaj impostoj kaj la situacio de l' laboristaj klasoj").

Intermite Lasalle vigle laboras, propagandas por la socialistaj ideoj, polemikas plue kontraŭ la etburĝaj radikaloj. Li batalas por la fondo de Tutgermania Laborista Asocio kaj sukcesas kun la helpo precipe de Leipzig'aj laboristoj starigi la Asocion 23. majo 1863. Malgraŭ la energia laboro de sia prezidanto Lasalle, la Asocio progresis nesufiĉe; ĝi devis senĉese lukti kontraŭ la disĉiplaro de l' etburĝa ekonomiisto Schultze-Delitsch.

Al tiuj tempoj rilatas aliaj verkoj de Lasalle: "Malferma respondo al Centra K-to, starigita por kunvenigo de Tutgermania lab. Kongreso en Leipzig", "Al laborista problemo", "La Franciaj naciaj laborejoj de 1848", ankaŭ "Festenado, gazetaro kaj la Frankfurt'a Kongreso" kaj famega "Bastia-Schultze el Delitsch" (Kapitalo kaj Laboro).

Lasalle mortis en Svisio, kien li estis forveturinta kurac-cele. Lia morto estis tragika kaj samtempe absurda, kiel multo el lia persona intima vivo: dum duelo kun hungara oficiro lin trafis kuglo, ĉesiginta lian mallongan, sed multlaborozan vivon. La 31. aŭgusto 1864 en Genève Lasalle ellasis la lastan elspiron.

* * *

Lasalle bone elmontris la esencon de l' moderna sociordo, la diferencon inter la interesoj de l' burĝaro kaj proletaro, kiun diferencon maleblas forigi ia interklasa "harmonio". Li konsideris unu el plej gravaj taskoj de l' demokratio la konkeron de l' ĝenerala voĉdon-rajto; sed, aliflanke, li iom erare supertaksis la valoron de parlamentismo kaj la eblecon de senperforta perreforma alveno de socialismo — eraroj, kiujn interalie estis ofte malkovrinta K. Marx.

La senekzempla oratora talento de Lasalle, uzita de li por la defendo de l' proletara ideo; lia politika agado entute kaj vigla socialista propagando; la riĉa literatura kaj scienca heredaĵo, kiun li forlasis post si; la fondo de Tutgerman. lab. Asocio, kiu poste kunfandiĝis kun la fama germ. social-demokratio, gvidita de W. Liebknecht kaj A. Bebel, kaj prezentinta el si unu el plej potencaj citadeloj de l' socialismo — ti-ĉio formas la plej indan monumenton, kiu ĉiam altos por la memoro kaj gloro de Ferdinand Lasalle, unu el plej viglaj pionir-militintoj por la ĝenerala afero nia, nia komuna celo: la socialismo.

V. Elsudo.

KORESPONDEJO

4224. La adresojn ni bedaŭrinde ne scias, ĉar ili ne havas konstantan adreson. Pro la du unuaj turnu vin al E. K. en Paris.

532. "erco" signifas metalminaĵo.

I. D. Via artikoleto aperos en venonta n-o.

K-do Prohorĉik-Minsk. Akcio sendita revenis, ĉar adreso nekonata!

1447. Viaj manuskriptoj bone alvenis. — 1839, 1305. Via art. bedaŭrinde estas traduko laŭ traduko. Enpreso duba. *N. B.*

Plej bonaj devas salti en de l' tempo fendon,
Super kadavroj nur iliaj ĝi fermiĝas,
Kadavroj nur iliaj estas la unika semo,
El kiu ŝprucas verdiĝante la matura planto
De l' popolarliber', tutmondon fruktigante.

Lasalle

El Ĉekoslovakio

Unue la kapitalistoj malaltigis niajn salajrojn ĝis duono, kaj poste la prezojn de ĉiuj vivnecesaĵoj suprenpelis ĝis tia alteco, ke ili ne plu povas supreniri, kaj fine la registaro deklaras, ke ĉio estas en ordo kaj ke nenio estas farenda. Por doni klaran bildon pri la hodiaŭa prezalteco, ni komparu la prezojn de vivnecesaĵoj antaŭmilite kaj samtempe konsumon de kvarmembra laborista familio.

	1914		1925
7 panoj po 60 heleroj	= k. 4.20	po kĉ. 4.—	= kĉ. 28.— (*)
4 kg da faruno po 39 hel . . .	= k. 1.56	po kĉ. 4.40	= kĉ. 17.60
1 litro da lakto	k. —.22		kĉ. 1.90
1 kg da bovoviando	k. 1.60		kĉ. 16.—
1 kg da porkviando	k. 1.20		kĉ. 15.—
10 ovoj po 6 hel	= k. —.60	po kĉ. —.80	= kĉ. 8.—
2 kg da sukero po 30 hel . . .	= k. 1.60	po kĉ. 5.30	= kĉ. 10.60
1 litro da petrolo	k. —.36		kĉ. 1.70
1 kg da sapo	k. —.76		kĉ. 8.60
1 kg da Na_2CO_3	k. —.08		kĉ. 1.40
1 kg da salo	k. —.14		kĉ. 2.—
1/4 kg da butero	k. —.24		kĉ. 6.—
3 kg da terpomoj po 6 hel . .	= k. —.18		kĉ. 2.55
1 kg da lardo	k. 1.80		kĉ. 14.—
1/4 kg da kafo	k. —.80		kĉ. 12.50
Sume	k. 16.96		kĉ. 145.85

Tiuj ciferoj valoras nur por nutraĵoj. Tolaĵo, vestaĵo, ŝuoj, hejtado, loĝejo, tio estas la dua parto, superanta la unuan. Tiuj ciferoj montras, ke hodiaŭ la prezoj de vivnecesaĵoj supreniris dek-ĝis dekduoble. Sed se ni komparas la nunajn salajrojn kun antaŭmilitaj, ni ekscias ke ili estas nur kvinoble pli altaj kaj nur en kelkaj fakoj sesoble. Krom tio la teksaĵ-industriistoj interkonsentis pri prezaltigo de teksaĵoj je pluaj 15 proc. Do ankaŭ la vestaĵoj fariĝos denove pli multekostaj. Samtempe la loĝeja koalicio aprobis la plialtigon de fundaj loĝej-lupagoj. Enkonduko de loĝejo-depago estas intencita, por ke estu financoj por konstruado de novaj domoj.

La prezaltigo de plej gravaj vivnecesaĵoj dum la jaroj 1923—24 evidentiĝas tiele:

	1923 dec.	1924 jan.	1925	aŭ
100 kg tritiko. . .	kĉ. 167.—	217.—	290.—	70 %
100 kg sekalo . .	kĉ. 114.—	217.—	230.—	100 %
100 kg hordeo. .	kĉ. 126.—	257.—	280.—	122 %
100 kg terpomoj	kĉ. 30.—	59.—	70.—	130 %
100 kg rizo	kĉ. 260.—	347.—	400.—	50 %

En sia parlamenta deklaracio pri la kareco en Ĉekoslovakio ministro Stříbrny (elp. Strŝibrni) montris al tio, ke la kareco ne estas apero nur ĉekoslovaka, sed tutmonda kaj ke en aliaj landoj la kareco estas pli granda ol en Ĉekoslovakio. Ke tiu aserto ne estis konforma al realeco kaj ke la kareco, aperinta en la tuta mondo, efikas pli premante en Ĉekoslovakio ol en plimulto de aliaj ŝtatoj, montras statistiko, kiu estis ĵus eldonita de la Internacia Labor-Ofico en Ĝenevo. Estas statistiko de realaj salajroj en diversaj grandurboj de la terglobo, inter aliaj ankaŭ Praha, ĉefurbo de Ĉekoslovakio. Kiel bazo de prikalkuloj servis al la Internacia Labor-Ofico la realaj salajroj en Londono, kiuj kiel konate, estas ankaŭ multe pli malaltaj ol antaŭmilite kaj devigas la anglajn laboristojn batali por ilia plialtigo. La Londonaj realaj salajroj estas en tiu statistiko difinitaj per cifero 100, por povi kompari ilin kun salajroj de l' aliaj ŝtatoj. Konsiderataj estas ĉe tio 18 plej gravaj kategorioj. La rezultato de la statistiko estas:

Philadelphia . .	221	Paris	74
Otawa	168	Berlin	63
Sydney	144	PRAHA	57
LONDON . . .	100	Bruxelles	54
Amsterdam . . .	85	Milano	50
Oslo	80	Madrid	48
Stockholm . . .	80	Roma	48
Wien	46		

El tiu-ĉi statistiko estas videble, ke la salajroj en Ĉekoslovakio apartenas al la plej malaltaj en la tuta mondo. Krom tio la statistiko ne estis farita antaŭ la lasta supreniro de la prezoj en Ĉekoslovakio kaj se la Internacia Labor-Ofico kompilus la statistikon nun, ĝi devus konstati, ke la realaj salajroj en Ĉekoslovakio falis sub la nivelo de l' salajroj en Vieno, faŝista Italio kaj Hispanio kaj fariĝis per tio la plej malaltaj salajroj en la tuta mondo.

Antikareca demonstracio en Praha okazinta la 10. februaro ĉi-jare sub partopreno de ĉirkaŭ 15000 laboristoj de ĉiuj partioj, estis dispelita per gumaj batiloj kaj revolverpafado de policistaro. Sep laboristoj estis vunditaj kaj ĉirkaŭ 50 arestitaj. Tiele oni agas kun laboristaro, klopodanta plimalgrandigi la ne plu elteneblan karecon. Sed kapitalistoj eraregas, opiniante, ke ili trankviligas la laboristaron per revolveroj.

Carlo Jirka, Satano 1574, Ĉes. Budejovice.

*) 1 Korona antaŭmilita aŭ 1 Korona ĉekosl. = 100 heleroj.

Reakcia bloko en Francio

La politika batalado nuna en Francio elmontras sub tipa aspekto la unuecon de l'reakcio en ĉiuj siaj vivorganoj, nome: bankistaro, klerikalularo, kaj ilia kara ido: la faŝismo.

Oni scias, ke kvankam ne estante laborista, la franca registaro estas tamen demokrata. La Socialista Partio donis al ĝi sian apogon. Flanke de klaspartio tio eble ŝajnas stranga, sed tamen estas logika kaj konsekvenca, fruktodona por la demokratio entute, kiu tiel havas vere respublikan registaron; kaj ankaŭ por la proletaro mem; ĉar la Soc. Grupo ĉe la Parlamento estas unu el la plej gravaj eroj de l'radikala plimulto, do la registaro devas nepre atenti la proletajn postulojn, doni reformojn pli kaj pli profundajn — ekzemple pri alvenigo de l'laboristarinfanoj al kompleta instruado kaj pri pliraciigo de l'impostoj, kiuj atingos la riĉulojn pli trafe ol ĝis nun.

Per tiaj jam voĉdonitaj leĝoj, per aliaj voĉdonotaj, la proletariaro ĉiam pli altiĝos spirite kaj materie, kaj konsekvence fariĝos pli kaj pli konsci-revoluci-kapabla, ĉiopova, revoluciigonta la mondon — kio estas ĝia historia rolo.

Ĝuste kaŭze de la reformo pli supre aludita — nome pliraciigo de l'impostoj — la grandaj kapitalistoj febre agitas kontraŭ sian patrion. Jes! tiuj "nekompareblaj patriotoj, tiom amantaj sian landon"... ili mem komplotas finance kontraŭ Francion! Ĉiaj rimedoj estas bonaj por tiuj fihomoj. Fine de lasta novembro, kiam la registaro alvokis ĉiujn civitanojn kunhelpi la sukceson de l'Nacia Prunto, tiam multaj kapitalistoj saltis en siajn luksajn aŭtomobilojn, kun siaj riĉaĵoj, alveturis Belgion, kaj ekspedis sian monon en "trankvilajn landojn", precipe en Anglion kaj Sudamerikon.

Kaj subite trankviligitaj, ili reveturis "la bonan teron de Francio", de iliaj firimedoj plimalriĉigita je ne malpli ol *kvin miliardoj*. — Tiu cifero estas certigita de belga bankisto, en kies manoj trapasis parto el tiu franca mono; do oni povas fidi lian diron!

Konsekvence de tiaj agoj, la £, iom pli antaŭe valorinta ĉ. 88 fr. frankojn, subite altiĝis ĝis 94 frankoj. Jen oni vidas, kiamaniere laboras la "bonegaj patriotoj francaj".

Nu, ilia komploto malsukcesis kaj la £ revenis ĝis ĉ. 90 frankoj.

"Kion do fari por ruinigi Francion, okaze de l'kaoso rekonkiri la potencon?", sin demandis la reakciuloj. Jen! ili trovis... ion mirigan! Ili alvokis *la kardinalojn* por sia helpo! "Espereble, ili pensis, la katolikoj obeos siajn kardinalojn". La ruzaj reprezentantoj de Dio verkis do ian pamfleton, en kiu oni "solene deklaris senkompatan militon al la laikaj leĝoj". Ĉu tio ne estis klara? Oni alvokis la katolikojn ribeli kontraŭ la Respublikon. Nu, neniun malordon oni rimarkis sur la stratoj; ĉiu trankvile iris sian kutiman laboron. Tion vidante, la pariza kardinalo, unu el la plej gravaj subskribintoj de l' alvoko, deklaris en sia katedralo, ke la kardinala verko estas simple "prikatekisma leciono al franca popolo"! Kaj la afero finiĝis kiel en komedio, per ĝojaj ridegoj.

Sed la reakciuloj ne konsideris sin kiel venkitajn; ili alvokis je sia savo... la bubojn el Alzas-Loreno[1]).

1) Franca provinco, en nord-oriento de Francio; antaŭ 1918 sub regado de l'Kaiser'a potenco, kaj kompreneble estrata de mezepokaj leĝoj kaj kutimoj.

Bone trovite! Ĉar ĝuste la franca registaro intencis ŝanĝi la katolikajn lernejojn de tiuj provincoj en lernejojn plurreligiecajn, t. e. en kiuj la infanoj ĉiureligiaj, kaj ankaŭ la senreligianoj, trovu laikan instruadon, kun ebleco por ili encerbigi la religian instruon en la lernejo mem, se tion iliaj gepatroj deziros.

Certe, tio ne estas ankoraŭ la pura respublika stato sed nur paŝo por atingi ĝin en la novaj provincoj.

Nu, tion ne volas la Alzas-Loren'a eklezio, nek la tuta reakciularo de l'cetera Francio. Kaj la pastroj aranĝis la 16. marto ĝeneralan strikon de l'Alzas-Loren'aj lernantoj por montri al la registaro, ke la etuloj nepre deziras brutiĝi pli kaj pli sub dia minacego.

Tre bedaŭrinde, la novstila bubstriko ne donis la rezultojn esperitajn de ĝiaj iniciatoroj; meznombre nur 40—50% da infanoj katolikaj obeis siajn pastrojn. Oni povas certigi, konsiderante la intelektan staton en Alzas-Loreno, ke la klerikalularo esperis strikantprocenton de 90—95%.

Do tiu nova atako kontraŭ Respubliko fiaskis ankaŭ. Por pliakrigi la ĉagrenon de niaj reakciuloj, jen la £ subite malaltiĝis de 93. 14 la 16. marto (tago de la striko), ĝis 92. 40 la 17-an! Alivorte, la franca franko plialtiĝis, kaj daŭrigas altiĝi: la £ kostis nur 91. 48 la 25. marto kaj 90. 96 la 26.

"Kion do fari por havigi al ni la potencon, subpremegadi la proletaron?" sinree demandis la reakciuloj. El ilia malgenia cerbo ne plu kapablas eliri eĉ makiavela ideo . . . Nur tion ĉi ili trovis: *perforte detrui* ti-kion ili malamegas: la proletariajn organizaĵojn, la respublikan registaron, kaj la Respublikon mem.

Kaj tion ĉi supre diritan mi certigas per nerefutebla dokumento: aliĝilo disdonita al iu studento, kiu poste komunikis ĝin al siaj amikoj. Tiu aliĝilo estas presita de "Patriota junularo" de iu kvartalo Pariza (oni ne mencias sur ĝi la numeron). El tiu alvoko mi elĉerpas la plej tipajn demandojn:

Ĉu vi posedas aŭtomobilon? Ĉu vi *estas armita?*

Ĉu vi povos batali *okaze de ribelo?*

Ĉu vi povos fariĝi ano de *mobila grupo* kiu *okaze de ribelo* aŭ de *granda manifestacio*, iros malproksimen por *iaj aferoj?*

Ĉu vi povos alglui afiŝojn (dumnokte?)

Ĉu vi povos *iri en provincon?* (elspezoj pagotaj)

Ĝuste per tiuj vortoj la faŝistoj italaj varbis por siaj batalionoj. Ĉu la provokon la francianoj konstatis? — Verŝajne. Oni rimarkas nun pli kaj pli grandiĝantan deziron pri unueco laborista. Antaŭ kelkaj monatoj, la ĉefa parto de l'Socialista-Komunista Kunligo aliĝis la Socialistan Partion (S. F. I. O.). Kaj nun, ni rimarkas saman intencon sur pli vasta skalo: La Unueca Ĝenerala Konfederacio de l'Laboro proponis al sia samcelorganizajo "Konfederacio Ĝenerala de l'Laboro", ke siaj respektivaj kongresoj okazu samtempe en Parizo, venontan septembron, por komune serĉi la sindikatan unuecon.

Espereble, tiu nobla provo sukcesos, la laboristoj jam interesiĝas pri la afero, pli kaj pli interesiĝos ĝis septembro. Ili starigos la unuecon laboristan sur unu el siaj plej firmaj lokoj: la sindikata.

Jen kiaj estos la fruktoj de l'fiagado de la Reakcia Bloko. *F. Ŝamar.*

Iom pri la situacio en Hindio

La hodiaŭan staton de hindiaj masoj ni plej bone ekkonas el du komunikoj: 1) komuniko pri enketo pri salajro kaj labortempo; 2) komuniko koncernanta la vivmanieron de laboristoj en Bombay.

La komunikoj enhavas statistikajn (registarajn) nombrojn, tial oni devas ilin konsideri tre skeptike, sed tamen ili sufiĉe ilustras la mizeron de hindia proletaro.

La nombroj rilatas al 200000 laboristoj. Laŭ ili la meza tagsalajro estas 1 ŝ. 8 d. (ŝ = ŝilingo = 1,02 mk. = 1,26 fr.; d = penco, 1 ŝ = 12 d), do monata enspezo proks. 2 funtoj. Virinoj ricevas nur duonon. La labortempo estas 60-hora, la laborsemajno enhavas 6 tagojn.

La unua komuniko pli rilatas al la plibone pagataj laboristoj, ĉar laŭ informoj de statistika oficejo por jan. 1921 eĉ la faklaboristoj ricevis ofte nur 26 ŝ. 8 d. pomonate. Kompreneble nuraj nombroj ne donas sufiĉe klaran bildon pri la situacio. Unue oni devas sciiĝi pri la ĝeneralaj vivkondiĉoj de hindia laboristo, kies mizero tute similas al tiu, kiun priskribis Engels en sia fama verko pri la angla laboristaro (jaro 1844).

La dua komuniko sciigas pri la loĝeja situo: 97% da laboristaj familioj loĝas en loĝejo havanta nur unu ĉambron; 70% de loĝejoj en Bombay enhavas nur unu ĉambron . . . Ekzistas 3125 unuĉambraj loĝejoj en kiuj vivas minimume po 2 familioj kaj en 275 vivas eĉ pli!

La akvoprovizo estas tre malbona, ofte estas ĝenerala malsato kaj pro tio grandaj epidemioj. Vere tragikan bildon liveras la nombroj pri la morteco de suĉinfanoj. En la jaro 1921 mortis el ĉiuj 1000 infanoj 666. Kompare ni aldonu la nombrojn pri aliaj grandurboj: Berlin 135, Paris 95, London 80, New-York 71.

En unuĉambraj loĝejoj la nombro altiĝas ĝis 828 el 1000! Antaŭ tia konstato la regna informo nur enhavas kelkajn vortojn senkonsilajn (preskaŭ mokajn) "necesas, ke la registaro iom pli okupu sin pri la loĝeja problemo".

60% de laborista enspezo estas elspezataj por nutraĵo, la resto por loĝejo kaj vestaĵo. Per tio por kulturaj bezonoj restas nenio. Sed malgraŭ tio, ke pli ol duono de salajro estas elspezata por manĝaĵo, la lasta estas tre malbona. La komuniko mem diras la jenon: "La kvanto de grenfruktoj formanĝataj de industrilaboristoj en Bombay, estas pli malgranda ol tiu kiu estas norma por malliberejoj!"

Plua grava fakto estas, ke ĉiuj laboristoj estas ŝarĝataj de ŝuldoj. Kion tio signifas, komprenos ĉiu eksciinte la procenton de pruntaĵoj (75%!). Krom ĉi pruntaĵoj, kiujn oni faras nur en ekstraj okazoj (ekz. edziĝo ktp.), tre disvastigita estas la aĉeto je kredito, kiu tre plikarigas la nutraĵon.

Oni povus kontraŭparoli la nombrojn pro tio, ke ili koncernas nur etan parton de hindia popolo. Sed la nombroj tamen gravas ĉar estas karakteraj pro la rapida industriiga procedo en la lando. Proks. 36000000 homoj vivas de industrio. El ili ĉirkaŭ 9000000 laboras en la moderna fabrikindustrio, la resto estas metiistoj. Sed ĉie iom post iom la metio mortas sekve de enporto de pretaj fabrikaĵoj kaj ekfloro de grandindustrio en la lando mem. Sekvo de tio estis, ke la nombro de metiistoj malgrandiĝis dum unu jardeko de 45 ĝis 36 milionoj. La superrega industrio estas la kotonindustrio estanta en la posedo de *hindia* kapitalo, kiu ekde mondmilito iom konkuras kun la anglaj varoj. En la pasinta jaro la produktado malgrandiĝis pro enporto el Lenkŝir (Lancashire-Anglio). La duagrada jutindustrio (juto = hindia kanabo) estas en la manoj de angla kapitalo, kiu vere entute mastras la ekonomian kaj politikan vivon de "hindia kolonio". La hindiaj junkapitalistoj lernas de siaj "fratoj" la ekspluaton de laboristoj.

Kune kun la kresko de industrio kaj de laboristaro kreskas la klaskonscio de l'proletaro pli kaj pli. La organiziĝo de laboristaro bone progresas. Dum la lasta jardeko okazis strikoj de ĝis nun ne observita grandeco.

La laboristaro multe batalis por transiri de 15-hora labortago al 12-hora, de 12-hora al 10-hora. Ĉi batalon la angla laborista registaro ne subtenis, eĉ kontraŭ ĝi ĵetigis bombojn el aeroplanoj sur laboristojn (Vidu M. Bur, Nova Anglio 1924).

La revolucia movado proletara havas potencan liganon en la milionoj da kamparanoj terure mizerigataj de anglaj ekspluatistoj. Pro centjara subpremo ili estas ankoraŭ obtuzaj, sed ĉiam denove en diversaj lokoj la malkontentuloj aktiviĝas. La plej grandaj ribeloj okazis en la jaro 1920, ili restis ne multe efikaj pro perfido de naciistoj. Tamen la provokoj de la registaro rilate al "bolŝevikaj agentoj" subtenataj de hindia burĝa naciularo kaj la persekutadoj ne sufokis la movadon, ĉar la fundo estas fruktodona. La juna laborista kaj kamparana partio, batalanto pro liberiĝo de hindia proletaro, jam naskiĝis, kaj ĝi kreskos malgraŭ ĉiuj penoj de interligitaj imperialismo kaj naciularo.

2921.

VARBU NOVAJN ABONANTOJN!

Turkestano

La Soveta registaro disponigis tutan sendependecon al la popoloj, loĝantaj en Turkestano. Por ĉi celo en Turkestano estis formitaj novaj respublikoj — Uzbekistano, Turkmenistano kaj aliaj. Ĉiu respubliko estas tute memstara.

La respublikoj kune formas Union de Sovetaj Respublikoj de Turkestano. Pro la okazantaj nun unuaj kongresoj de sovetoj en novformitaj Uzbeka kaj Turkmena respublikoj, intereso de la gelaboristaro pri tiu ĉi malproksima lando pli kaj pli grandiĝas. Tial ni konatigas nian gelegantaron kun tiu ĉi lando.

I.

Turkestana Unio de Sovetaj Respublikoj troviĝas en Azio. Ĝi okupas spacon ĉirkaŭ homstaturo. Je la ĉaro oni jungas ĉevalon aŭ azenon, ornamitan per vitroperloj kaj floroj. Sur la ĉevalo rajdas "arabakeŝ" (veturigisto), li gvidas ŝarĝoplenan arba-on kaj malrapide kantas sian malgajsonan kaj ĉiam similan kanton. La grandaj radoj de arba estas bezonataj por transveturi la arik'-ojn, tre ofte senpontajn.

En Turkestano oni semas tritikon, hordeon, milion kaj rizon. Multe da akvo bezonas la rizo. Rizkampoj dum kelkaj monatoj devas esti tute kovritaj per akvo. La rikoltoj fariĝas bonaj. Ofte oni eksemas la rizon dum junio, tuj post kolekto de antaŭvintre semita hordeo. Sur la samaj kampoj de kiuj oni junie rikoltis hordeon, aŭtune oni rikoltas rizon.

En Turkestano kreskas tre multaj fruktoj kaj legomoj. Ĉi tie estas pomoj, piroj,



unu kaj duonan milionon da kvadrataj verstoj.

En Turkestano estas multaj altaj montoj, eterne neĝkovritaj. Somere la neĝo varmiĝas de suno kaj degelas. Pro fluanta de montoj akvo la tero fariĝas tre fruktodona. Pliutiligante la montajn riveretojn por akvumado de kampoj oni aranĝis multajn kanalojn. La kanaloj aŭ, kiel oni ilin tie nomas — "arikoj", traigas la kampojn, urbojn kaj "kiŝlakojn" (vilaĝojn). Preskaŭ ĉiuj stratoj enhavas la kanalojn.

Somero en Turkestano estas tre varmega kaj senpluva. La pluvoj preskaŭ tute ne okazas. Dum junio kaj julio varmegas preskaŭ netolereble (temperaturo superas 50—55 gradojn). Pro la varmego tero fendiĝas. Nenie estas pli multe da polvo ol en Turkestano. Spirado estas malfacilega. Kelkan freŝecon kaŭzas "arikoj". Stratojn oni akvumas 2—3foje dum la tago, kaj spirado per ĝi plifaciliĝas. Somero en Turkestano daŭras 7 aŭ eĉ 8 monatojn. Aŭtuno estas pluvoriĉa. Sed ekpluvas malfrue, proksimume je novembro kaj decembro. Vintro estas mallonga, sed tamen iafoje okazas sufiĉaj frostoj. Precipe nokte estas malvarme, neĝetas; tage, tuj post reapero de suno, restas neniaj postsignoj de malvarmo kaj neĝo.

Por veturado kaj transportado de ŝarĝoj en Turkestano estas uzataj "arba"-oj. La *arba* estas ĉaro, havanta tre grandajn radojn. La radoj diametre estas pli altaj, ol la persikoj, abrikotoj, akvomelonoj, melonoj kaj vinberoj la plej diversspecaj. Precipe gravan signifon por Turkestano kaj la tuta Unio de S. S. R. prezentas vegetaĵo de kotono. El ĝiaj fruktoj oni fabrikas kotonan oleon. Ĉi fruktoj estas ĉirkaŭvolvitaj per kotonoj. El la lasta oni fabrikas manufakturajn komercaĵojn: katunon, tolon kaj aliajn. Ĉe kotonplantejoj laboras multaj dunglaboristoj.

Jam de longa tempo en Turkestano oni okupiĝas per silkfabrikado. Multe da silko oni eksportas Rusion.

Tamen kulturebla tero okupas nur malpli grandan parton de Turkestano. Pli multaj tie estas sabloriĉaj dezertoj.

En Turkestano loĝas multaj popoloj: uzbekoj, kirgizoj, turkmenoj kaj aliaj. Preskaŭ ĉiu urbo dividiĝas je du partoj: nova kaj malnova urbo. En novaj urboj loĝas eŭropanoj (rusoj, ukrainoj k. a.); en malnovaj urboj loĝas indiĝenaj popoloj.

Plimulto de loĝantaro ne scias legi, estas malklera kaj, ĝis nun, tre religiema. La veneno de religio estas ankoraŭ tre disvastigita ĉe turkestanaj popoloj. Pastroj (mulloj) ankoraŭ forte influas. La virino ne povas eliri straton kun neŝirmita vizaĝo.

La loĝantaro de Turkestano okupiĝas per agrikulturo, brutbredado kaj komerco. Vivo de dunglaboristoj vilaĝaj en Turkestano estas tre malfacila. "Mulloj" (popoj) kaj "bajoj" (riĉuloj) trompas dungataron. Grandaj fabrikoj en Turkestano estas tre multaj. Sed tie estas multaj malgrandaj fabrik-metiejoj. Tie oni prilaboras ledon kaj silkon. Estas fabrikataj multaj tapiŝoj kaj aliaj objektoj.

La plej multloĝantara kaj komerca urbo de Turkestano estas Taŝkento. Rusaj bienposedantoj, kapitalistoj kaj cara registaro sklavigis turkestanajn popolojn. Rusa komercisto kaj cara oficisto havis solan okupon: rabi turkestanajn laboristojn kaj "deĥkanojn" (vilaĝanojn) kaj mokegi ilin.

La soveta registaro liberigis turkestanajn popolojn. Sindikatoj, kompartio kaj soveta registaro defendas laboristojn kaj vilaĝanojn de ekspluatado mastro-riĉula.

Laboristoj kaj vilaĝanoj turkestanaj fariĝis plenrajtaj posedantoj de sia lando. Nun ili ĉiurimede penas liberiĝi de superstiĉaj kaj malklerecaj ĉenoj.

El "Batrak" (Vilaĝa dunglaboristo), no. 7, 1. marto 25, trad. *K. Koblov. (3805)* Taŝkent.

RUĜA HELPO

Kamarado Lancucki

La malkondamno de l'kamarado Lancucki en Przmysl neniun erarigu! Tio neniel signifas, ke k-do Lancucki nun estas libera. Tute male, k-do Lancucki ne estas liberigita kaj atendas tutan serion da novaj procesoj. Por karakterizi ta situacion, estu memorigate, ke laŭ aŭstra leĝo (en Polio validas ĉiam ankoraŭ la malnovaj rusaj, germanaj kaj aŭstraj punkodoj), en Galicio procesoj pro landperfido estas traktataj ĉe asizoj (ĵuraj alsidantoj) kaj oni laŭ tio povas atendi surprizon. Kvankam ankaŭ en Galicio la plej kruelaj juĝoj kontraŭ politikaj akuzitoj estas farataj (nur antaŭ nelonge junul-kamarado estis mortkondamnita pro transporto de flugfolioj), tamen ne tute senkaŭze enradikiĝis la opinio, ke ĝenerale estas facile esti kondamnata en Galicio, ol en Kongrespolio aŭ en la iame germana parto de Polio, kie la oficantaj juĝistoj konsideras kiel honora afero, kondamni ĉiun revoluciulon je minimume kvinjaro da punmalliberejo (10 kaj 12 jaroj kiel puntakso estas kutimaj). — Tiun ĉi por Galicio favoran opinion la pola burĝaro utiligis por si, kiam ĝi faris la unuan proponon por transdono de l'deputito k-do Lancucki de galicia prokuroro. Per tio fariĝis multe pli facile por ĝi, efektivigi la transdonon, ol okaze se la propono je transdono estus farita de la prokuroraro de Kongrespolio aŭ Polio. Sed kiam estis atingita tiu transdono, estis facile, ebligi pluajn transdonojn de Lancucki, kio fakte okazis en tuta serio da kazoj. La novaj transdonoj rilatas jam al Kongrespolio, kaj oni povas estis certa, ke se ne la proletaro de Polio kaj de l' eksterlando efikas plej fortan premon je la pola registaro, la sorto de l' kamarado Lancucki estas decidita.

K-do Lancucki plue troviĝas en mallibereјo kaj estas en la komenco nur de tuta serio da procesoj.

K-do Lancucki estas perdita, se la proletaro ne helpos al li!

DISKUTEJO

Pri SAT-plibonigo kaj unuigo de proletara Esperanto-movado

SAT estas ja vivanta organismo. Tion pruvas la pulsoj, kiuj batas diversloke, diversfake, diverscele. Iuj estas negativaj, malsanigaj kaj celas nur detrui la organismon; aliuj male signas pozitivan celadon al perfektigo, plikreskado, plifirmigo de la juna SAT-organismo. La unuaj tendencas al disigo, apartigo; ili estas tute saturitaj je sektemo, partia fanatikeco kaj aliaj similaj ecoj. La duaj celas nur trovi la plej bonajn vivkondiĉojn por ke la organismo normale malvolviĝu kaj plenumu sian taskaron.

La ĉi-subaj konsideroj de k-do 2921 apartenas certe al la dua kategorio de pulsantaj fortoj, baraktantaj en SAT.

Antaŭ kvar jaroj, kiam SAT stariĝis kaj celis, sur tutmonda skalo, apliki esperanton por la servo de la tutmonda proletaro, la konsideroj diritaj ĉi-sube tre certe mistrafus la celon. Psikologiaj kaj materialaj baroj estis tiutempe tro fortaj por ke objektive pensanta homo povu prezenti al si la efektivigon de tia plano.

Ĉu hodiaŭ la konkreta kaj psikologia stato de la esperanta afero povas pravigi la vidpunkton de k-doj 2921 kaj Kolĉinski (Vidu la n-ron 13 de S.)? Parolante sincere, ĝis nun mi ne sukcesis plene konvinkiĝi pri tio...

Sed almenaŭ ne estas domaĝe, ke la temo estu larĝe debatata. E. L.

La lastaj jaroj montris al ni etan progresadon de prol. Esperanto-movado. Ni havas multajn malgrandajn organizaĵojn agantaj laŭ diversaj skaloj (sennacia, lingvoregiona, landa ktp.). Ĉi organizaĵoj plenumas la saman laboron "per" kaj "por" Esperanto, kvankam ili ekstere sin diferencigas kaj apartigas. (Vidu artikolon de k-do Kolĉinski Sen. n-o 13, 1924).

Niaj fortoj estas disigataj en tempo, kiam la solidareco kaj unikfronteco devus antaŭenpuŝi nian aferon.

Multaj k-doj jam delonge sopiris pri unuigo de ĉiuj proletaj esperantistoj je *unueca, aktiva* kaj *amasa, sennacieca* organizaĵo en kiu la per- kaj poresperanta laboro harmonie disvolviĝus, kia estus kontinua fronto kontraŭ la burĝoj. La faktoj pruvas, ke tempo por la koncentrigo de nia movado jam estas matura kaj ĉi aktuala problemo jam okupas multajn k-dojn en Sovetio, Germanio, Francio kaj aliaj landoj.

Nia movado havas sennaciecan organizaĵon, kies idearon principe aprobas la plimulto de proletaj esp-istoj eĉ ne SAT-emaj. La SAT-organizmetodoj tial devos esti bazo por la unuiĝo. Ekzistas k-doj ne emantaj al SAT pro ne-finkonstruo kaj mankoj en la nuna organizo: kelkaj diferencoj inter diversaj partianoj, nesufiĉa demokrateco, ŝajna neebleco de poresperanta laboro ktp. Povas esti ke kelkaj asertoj de iaj k-doj estas troigitaj, sed tio ne gravas. Gravas, ke SAT estas la plej konvena bazo por la unuigo, ke la mankoj ne estas tiel malhelpecaj por malebligi la unuigon. Jenan skizon oni povas fari ilustrantan la principojn kaj metodojn de unuigo. Ĝi enhavas aliigojn kaj malnovajn punktojn de SAT-strukturo kaj organizo. La k-doj SAT-anoj estas petataj prikonsideri la punktojn kaj interŝanĝi opiniojn. Cetere la skizo nur estas fundamento sen detalaĵoj.

* * *

SAT-organizo

Principoj. 1. Plena demokrateca bazo [1])
2. Nenia burokrateco, libera iniciato
3. Proleta unikfronteco
4. Bazo ebliganta unuiĝon de l'tuta proletara Esp-o-movado.

Membreco. 1. SAT-membro povas esti ĉiu aprobanta la statuton kaj ne apartenanta al kontraŭproletara organizaĵo.

2. Ekzistas 2 membrokategorioj: aktivaj kaj pasivaj (lernantoj, subtenantoj ktp.). Aktiva membro povas fariĝi nur tiu, kiu buŝe kaj skribe uzas Esperanton. Ĉiuj SAT-servoj estas je dispono de ambaŭ kategorioj.

3. La membreco estas individua, sed nepre estas dezirinde ke ĉiuloke la SAT-anoj sin organizu en grupoj por koncentrigo de SAT-laboro.

4. Ĉiuj membroj pagas unuecan kotizon ĉiujare aprobenda per ĝenerala voĉdonado.

Centra organizo. 1. Ĉiujare okazas SAT-kongreso por konsiderado de teoriaj kaj praktikaj problemoj de la movado. Neniaj decidoj de kongreso validas, ĝis aprobo per ĝenerala voĉdonado. Ankaŭ pri proponoj, kiujn la kongreso malaprobas estu voĉdonata.

La voĉdonado devas esti finita kaj la rezultoj anoncitaj maksimume 12 semajnojn post la kongreso.

2. SAT-anoj de ĉiu sektoro elektas senpere, konforme al sia nombro, (*ĉiu sektoro nur por si mem kaj el si mem*) siajn anojn por la direkta komitato (ekz. ĉiuj 200 SAT-anoj — unu [2]).

3. La direkta komitato estas konsilantaro por plenumigo de agoj deciditaj de la membraro. Ĝi formas por praktika laboro la ekzekutivan komisionon.

4. Ĉiujare okazas novelektoj de direkta komitato.

Administrado. 1. La reciprokaj aferoj inter SAT-administracio kaj membroj povas esti direktaj.

2. Perado por SAT-grupoj en komunaj aferoj estas dezirinda.

Eldonado. 1. Por eviti diferencojn inter diversaj partianoj, oni oficiale elektu eldonkomisionon el reprezentantoj de ĉiuj polit. tendencoj, kiu ekzamenu indajn verkojn kaj decidu pri ilia presigo.

2. La akcioj de eldonkooperativo laŭeble estu universalaj transpagiloj por proletaj esperantistoj.

3. Sennaciulo restas informorgano kun nepolemikaj artikoloj, informoj pri laborista, SAT- kaj Esperantomovado.

4. Se la redakcio de Sennaciulo rifuzos presigi artikolon, pri tio *povas decidi* laŭ cifero 1 formenda gazetkomisiono.

Informgazetservo. 1. En ĉiu lingvoregiono (germana, franca, angla ktp.) oni aranĝu sennaciecajn informoficejojn, kiuj interŝanĝos sian materialon pere de centra SAT-informejo.

2. La informservoj laboras per konstantaj korespondantoj loke (esperkor).

SAT-grupoj. 1. Estiĝas per libera unuiĝo de SAT-anoj por kolektiva per-por-Esperanto-laboro.

2. Ilia organizo enhavas laŭbezone: laborrondojn, bibliotekon, Esperantokursojn ktp.

Fakoj. La SAT-anoj povas libere unuiĝi je sendependaj fakoj por komuna laboro ekz. poŝtistoj, metalistoj, fervojistoj, sportistoj, Esperantopropagandistoj (propagando-fakoj).

Unuigo de proletara Esperanto-movado

Konsiderante necesege sennaciecan unuiĝon por la tuta movado kaj amasan organizon estas dezirenda aliĝo de ĉiuj prol. esp. organizaĵoj al SAT surbaze de antaŭaj organizprincipoj. La procedo povas sendolore okazi jene:

1. Ĉiuj laboristaj esp. organizaĵoj transformiĝas resp. likvidiĝas. Ciuj peresperantaj entreprenoj (ekz. nacilingvaj gazetoj) estas transdonotaj al propagandofakoj (vidu sube).

2. La membraro de organizaĵoj SATaniĝas laŭ membrokategorioj.

3. La lokaj grupoj kunfluas kun SAT-grupoj. La lokaj Esp.-entreprenoj funkcias plue.

Poresperanta laboro en SAT-kadro estas devigata dank' al la fako-principo.

1. En ĉiu *lingvoregiono* la SAT-anoj speciale por Esperanto propagandantoj kuniĝas je aŭtonomaj (kiel aliaj SAT-fakoj) propagandofakoj.

2. Ĉiu propagandofako havos a) *Kooperativan eldonejon,* tasko: eldonado kaj disvastigado de *porsennaciisma* kaj *poresperanta* propaganda literaturo *nure nacilingva* (gazetoj, lerniloj, broŝuroj, flugfolioj ktp.). b) *Proletan Esperanto-Instituton,* tasko: Subteno de lab. Esperanto kursoj, de Esperanto-instruado, pritrakto de lingvaj problemoj.

3. La nun aperantaj propagandaj nacilingvaj gazetoj kiel Arbeiter-Esperantist, L'Antinationaliste, Soveta Esperantisto ktp. samkiel eldonejoj (librostokoj) de GLEA, "Nova Epoko" ktp. transiros por plugvidado al propagandofakoj.

4. La propagandaj fakoj estas sendependaj entreprenoj de aliĝintaj SAT-anoj. Ilia administracio estas elektata de koncernaj fakanoj.

5. La financa bazo de regiona koop. eldonejo unuiĝas el kotizoj de fakanoj, de eldonitaj akcioj kaj de vendado de ĝia literaturo. Subteno flanke de SAT okaze estas dezirinda. La eldonejo ĉiam havu kontakton kun la (speciale esperantlingva) SAT-eldonkooperativo. (La viveblecon de sendependaj koop. eldonejoj pruvas la Nova Epoko en Moskvo).

Tiamaniere estas eble efektivigi unuecon.

Vivu sennaciismo! *2921.*

[1]) Ĉu ekzistas pli demokrateca sistemo ol ĝenerala voĉdonado de la membroj?

[2]) Ĉu ne ekzistus danĝero je ia "sektora patriotismo"?

Decido de la grupo Wormerveer (Nederl.):

"Ni prenis la decidon por tri monatoj aboni por ĉiuj niaj membroj nian

Sennaciulo.

Ĉiuj anoj do povos konatiĝi kun nia gazeto, kaj kiam ĝi plaĉos al ni ĉiuj, ni eble povos daŭrigi la kolektivan abonon.

Ni do plifortigas la ekziston de nia gazeto kaj esperu ni ke multaj laboristaj kluboj sekvos tiun ĉi ekzemplon."

SAT-anoj!

Metu ĉi supran temon sur la tagordon en viaj grupkunvenoj!

ALVOKOJ KTP.

SAT kaj TLES

La SAT-anaro de Cassel en sia lasta kunveno ege bedaŭras la izoliĝon de l' anarkistaj k-doj, fondantaj novan senŝtatan organizajon, kiel malfortigo de revoluciemaj fortoj. La kunvenintoj diverspartiaj deziras, ke la SAT-frakcioj estu nure propagandfakoj por forte efiki kaj propagandi en la koncerna partio. En SAT ni nur estu SAT-anoj!

Laŭ nia opinio ne estas necese eldoni novan gazeton, ĉar per „Sennaciulo" estas garantiite, ke la anarkistaj k-doj povas propagandi kaj enmeti artikolojn por la TLESa movado. Ili nur devas verki tiajn artikolojn kaj ensendi redaktejon de "Sennaciulo". Ni ege petas la anarkistajn k-dojn, resti en SAT kaj kunhelpi servigi Esperanton por la tutmonda proletariaro revoluciema. Unuigitaj sur la bazo de propagando de Esperanto, la laboristoj ĉiupartiaj povas komune labori fervore. Ni ne estu partiaj fanatikuloj kaj detruantoj.

Fred. Deiters (264), Georg Ort (279), Heinrich Trinter (3279), Luise Hodek (2301), Ferd. Merker, Erich Richter, Karl Kyas (447), Wilhelm Becker (886), Rud. Thomser (780), Wilhelm Bock (1722), Carl Mailand (265).

Al la Socialistaj SAT-anoj

Kamaradoj!

Kelkaj el vi plendas pri la trooftaj artikoloj komunistemaj en "Sennaciulo". Ĉu iu el vi sendinte artikolon socialisteman al S., jam trafis malakcepton? Eble ne! Tiam, pro kio senĉese vi murmuradas?

Socialistaj SAT-anoj, Sennaciulo estas gazeto via kiel ĝi estas tiu de alipartiaj kamaradoj. Do, kunlaboru. Montru ke vi estas vivantaj! Ĉu SAT ne havas socialistajn membrojn en via lando? Se jes, ili verku artikoleton pri sia partio, pri sia sindikato, pri sia kooperativo. La redakcio de S. devas akcepti viajn artikolojn. Sed verkante neniam forgesu, ke en SAT troviĝas nesamopiniantoj. Vi estu toleremaj kaj viaj artikoloj neniam entenu insultojn.

La kamaradoj kies artikoloj estus malakceptitaj de la redaktoro estas insiste petataj skribi al la subskribinto.

Leon Bergiers,
membro de la Belga Socialista Partio
prezidinto de la IV. Kongreso de SAT.

Laboristaj, Studentaj, Vilaĝanaj korespondantoj Atentu!

Blankrusa Esperanta Gazet-Informa Oficejo

petas ĉiulandajn samideanojn sendi al BEGIO artikolojn kaj korespondajojn pri diversaj temoj (laborista movado, vivo, pri studenta vivo, pri laboristaj kluboj, pri literaturo, pri observado de SAT-anoj, pri teatro, medicino, socia vivo, marksismo ktp.)

Artikoloj kaj korespondajoj estos presitaj en jurnaloj kaj gazetoj.

Studentoj, junuloj kaj infanoj — sendu viajn leterojn.

Blankrusaj studentoj, junuloj, komunista junularo, pioniroj-infanoj al vi respondas. Respondo garantiata.

Oni akceptas fotografajojn, vidajojn, PKI, naciajn gazetojn ktp. *Adreso:* Sovet-Unio. Blankrusio. *Minsk.* Poŝtkesto 33, *Dim. Snejko* (Gvidanto de BEGIO).

Al la anarkistoj

La unua volumo de nia scienca biblioteko — la "Etiko" de P. Kropotkin estas jam transdonita al la eldonkooperativo de SAT por la aperigo. Ĝi atendas nur ke oni mendu ĝin. La dua volumo — "L' anarkismo" de A. Borovoj estas ankaŭ jam fintradukita kaj pretigata por la aperigo. La eldonadon de ĉi grandvalora, ekzistanta nur en rusa lingvo, verko promesis al ni kamarade la eldonejo "Oeuvre Internation. des Editions anarchistes" (Ellaborajo Internacia de anarkistaj eldonajoj) en Parizo. Tuj kiam la monstato de ĉi organizajo permesos tion, ĝi aperigos nian tradukon. Ankaŭ aliaj verkoj estas jam tradukitaj, sed pri ilia sorto ni dume nenion povas diri. Tamen la k-doj estas petataj daŭrigi sian laboron kaj provizi nin per tradukajoj. Ni petas la k-dojn: Haine, Quarone, Eder, Bosma, Sweiker kaj Pargaĉevski informi nin tuj pri la stato de ilia laboro. Se la verkoj de ili tradukataj estas jam finitaj, ili sendu ilin plej eble baldaŭ al ISAB.

La k-doj kapablaj traduki el esp-o nacilingven estas petataj sin anonci al ISAB. Precipe estas petataj la k-doj scipovantaj la italan kaj la hispanan lingvon, ĉar en ĉi lingvoj ni povas pli facile eldoni niajn tradukojn (al ni estas promesita helpo de eldonejoj). Kuraĝon amikoj! Daŭrigu vian laboron, varbu mendantojn por la "Etiko". Ĉion sendu al J. M. Esperanto 9, Rue Louis Blanc, 9, Paris X., Francio.

P. S. Ĉiuj korespondantoj de ISAB estas petataj ĉiam aldoni respondkuponon.

SAT-varbantoj en Sovetio!

"Laborista Solidareco" en Kremenĉug intencas la eldonon de propagandilo nova, por kiu estas necesaj la *adresoj de ĉiuj k-doj varbemaj el ĉiuj urboj de Sovetio!*

La k-doj bonvolu komuniki siajn adresojn poŝtkarte al: *"Laborista Solidareco"*
V. Kolĉinski — Kremenĉug.

Kropotkin pri rusa revolucio

(Fino)

— La grandioza konstrua laboro, postulata de socia revolucio ne povas esti plenumita de centra registaro, eĉ se ĝi havus kiel gvidilon por sia laboro ion pli esencan, ol kelkaj socialistaj kaj anarkistaj broŝuroj. Ĝi postulas la konon, la cerbojn, kaj la volontan kunlaboradon de amaso da lokaj kaj specialistaj fortoj, kiuj sole povas ampleksi la diversecon de ekonomiaj problemoj en iliaj lokaj aspektoj. Forsvingi tiun kunlaboradon kaj konfidi al la genio de partiaj diktatoroj — estas detrui ĉiun sendependan kernon, kiel sindikatoj (nomataj en Rusio "Profesiaj unuiĝoj") kaj lokaj distribuaj kooperaj organizajoj, transformante ilin en burokratajn organojn de la partio, kiel ĝi estas farata nun. Sed tio ne estas la vojo por fari revolucion; ĝi estas la vojo por neebligi ĝian realigon. Kaj jen kial mi konsideras kiel mia devo serioze averti vin ne sekvi similan agadlinion.

Imperialistaj konkirantoj de ĉiuj nacioj povas deziri ke la loĝantaro de la eks-imperio Rusia restu en mizera ekonomia stato, plejeble longe kaj tiel estu kondamnita provizi Okcidenton kaj Mezan Eŭropon je krudajoj, dum la okcidentaj manufakturistoj, produktantaj manufakturajn varojn ricevu ĉiujn profitojn, kiujn la loĝantaro de Rusio povus aliel obteni el sia laboro. Sed la laboristaj klasoj de Eŭropo kaj Ameriko kaj la intelektaj kernoj de tiuj landoj certe komprenas, ke nur per la forto de konkiro ili povus meti Rusion en tian subigitan staton. Samtempe la simpatioj, kun kiuj nia revolucio estis renkontita tra la tuta Eŭropo kaj Ameriko, montras, ke vi estis feliĉaj saluti en Rusio novan membron de la internacia unuiĝo de popoloj. Kaj vi certe baldaŭ ekvidos, ke estas en la intereso de la laboristoj de la tuta mondo, ke Rusio eliru kiel eble plej baldaŭ el la kondiĉoj, kiuj paralizas nun ĝian disvolvon.

*

Ankoraŭ kelkaj vortoj. La lasta milito starigis novajn kondiĉojn de vivo en la civilizita mondo. Socialismo, certe, faris konsiderindan progreson, kaj novaj formoj de pli sendependa vivo certe estos baldaŭ kreitaj sur la principoj de loka politika sendependeco kaj libera volo en socia rekonstruo, ĉu per paca vojo, ĉu per revoluciaj rimedoj, se la intelektula parto de la civilizitaj popoloj ne partoprenos en la tasko de neevitebla rekonstruo.

Sed la sukceso de tiu rekonstruo dependas grandmezure de la eblo de intima kooperado de diversaj popoloj. Por tiu kooperado la laboristaj klasoj de ĉiuj nacioj devas esti intime ligitaj kaj por tio la ideo de granda Internacio de ĉiuj laboruloj de la mondo devas esti renovigita; ne en la formo de unuiĝo, direktata de unu sola partio, kiel okazis en la Dua Internacio kaj okazas denove en la Tria. Tiaj unuiĝoj, certe, havas sian ekzistorajton, sed apud ili kaj unuiganta ilin ĉiujn devas ekzisti unuiĝo de ĉiuj sindikatoj de la mondo, de ĉiuj kiuj produktas la riĉon de la mondo unuigitaj por liberigi la produkton de la mondo el ĝia nuna sklaviĝo al kapitalo.

P. Kropotkin

Trad. el "Freedom" n.ro 374 Ajnulo.

Iom da sprito

Demandita pri la nova registaro en Germanio, Karl Radek jenon diris:

— Sola, al kiu mi ne envias, estas la katolika centro en Reichstag!

— Kial?

— Ĉar el la fajro ĝi trafis sub flamon. Ĝi estis sub regado de marksismo, kaj nun ĝi estas sub luteraneco.

— Nu, certe. Ja la registaro de Marx estas anstataŭita de la registaro de Luther!

El "Ogonjok" esperantigis 1516.

La lingvo de dio

Du soldatoj diskutas siajn aventurojn. Unu de ili priparolis la konduton de la ĉinoj kies militistoj, antaŭ ol ili komencas batali, ĉiam preĝas. "Kompatindaj diabloj", respondis la dua, "kiel ili atendas ke dio komprenos ilin preĝantajn ĉine?"

En la lasta dramo de George Bernard Shaw, "St. Joan", unu el la juĝistoj de Joan[1]) pruvis ke ŝi estas herezulino, ĉar laŭ ŝi dio kaj la sanktulinoj parolis al ŝi *france*, ne angle.

[1]) Johanino (d' Arc).

TRA LA KLASBATALO

En Ostrovo-Ĉekoslovakio, kie strikas 88 % de la minlaboristoj, okaze de demonstrado la laboristoj kunpuŝiĝis kun ĝendarmaro. Du laboristoj estas mortpafitaj, kvin grave vunditaj.

En Norda Sakalino, cedita de Japanio al Sovet-Unio, estas suprentirita la soveta flago.

La pola ambasadoro en Minsk estas forpelita de sovet-unia teritorio. Li protektis la polan fipastron Uzas, kiu estas akuzita pro bestaj krimoj kontraŭ inoj kaj infanoj. La proceso kontraŭ li okazos en Leningrad.

En Böhlen apud Leipzig mortis 11 laboristoj pro enfalo de kamentubo. — En Karnap apud Essen nova minkatastrofo: 12 mortintaj minlaboristoj.

En la antibolŝevista tendencproceso en Leipzig la regna prokuroro pledas por 5 mortkondamnoj. La pruvmaterialo de la defendantaj advokatoj estas plene ignorita. Senkompara tribunala krimego!

En Berlin 10 000 metallaboristoj estas lokaŭtitaj.

La prusa landparlamento elektis la socialdemokraton Braun ministroprezidanto.

La ribelo de negraj gentoj en Sudokcidenta Afriko estas sufokita de angloj.

Esperanto en la praktiko

El la Internacia Transportlaborista Federacio

La tutlanda kongreso de la Estoniaj fervojistoj, 25. ĝis 27. marto decidis aliĝi al la ITF.

Ankaŭ la estraro de la finnlandaj fervojistoj proponos je la venonta kongreso la aliĝon.

En Eŭropo tiam nur la Sovet-Unio, Litovio, Portugalio kaj Turkio staras ankoraŭ ekster la vicoj de la Federacio Internacia.

Fakto karakteriza je la praktika uzebleco de la mondhelplingvo Esperanto estas sendube, **ke tuta la korespondado kun la estoniaj fervojistoj** kiu kondukis al la aliĝo, **estis farita en esperanto.**

La ITF-oficejo kiu jam uzadis kaj uzadas la anglan, francan, germanan, hispanan, italan, svedan, kaj holandan lingvojn, nuntempe korespondas i. a. *esperantlingve* celante la aliĝon kun esperantistaj fervojistoj en Turkio, Portugalio, Persio, Japanio kaj Ĉinio.

Peto

Okaze de Distriktkonferenco Berlin-Brandenburgo je la 17. majo ni intencas aranĝi ekspozicion de Esp-ajoj por interesi la laboristaron pri nia afero. Gek-doj, ni petas alsendi materialon, kiel poŝtk., sigelmarkojn, gazetojn, librojn, broŝurojn ktp. al adreso:

O. Jeserick, Damm 70, *Jüterbog* (Germ.).

Radiotelefonio

Esperanto-kurso de Moskva laborist-sindikata radiostacio daŭras plensukcese :: Okazontaj esperantlingvaj radioparoladoj :: Per SAT-servo ni helpu al pluaj sukcesoj de esperanto en laborista radiotelefonio ::

Anoncita en Sennaciulo radiotelefona kurso de Esp-o ĉe radiostacio de MGSPS en Domo de Sindikatoj havis jam ok ĉiusemajnajn lecionojn; la intereso estas tre granda kaj povas esti mezurita per pli ol 1000 disvenditaj en radio magazenoj lernolibroj de Esp-o kaj per multaj leteroj de aliurbaj laboristoj, petantaj ke la kurso estu ripetita per pli forta radiostacio (la stacio en Domo de Sindikatoj servas nur la urbon mem kaj ne sufiĉas por radiuso pli granda ol 20 klm). Antaŭ ĉiu leciono estas farata enkonduka 15-minuta raporto, temanta pri historo de esp-o, pri disvolviĝo de laborista esp-a movado, pri praktika utiligo de esp-o por proletaro kaj pri SAT.

En la antaŭa numero de Sennaciulo estis anoncita pri esperantlingva parolado, okazonta 20/IV de la stacio Sokolniki. Ĝia celo estas speciale provi aŭdeblon de tiu stacio en okcidenta kaj centra Eŭropo, precipe por laboristaj radio-amatoroj. Estas tre grave ke ĉiu aŭskultonto nepre informu la gvidanton de Radio-fako ĉe MGSPS (Moskva Intersindikata Komitato) pri la rezultoj, ĉu pozitivaj ĉu negativaj, adresante al Inĝ. Vinogradov, Moskvo, B. Dmitrovka, Dom Sojuzov, Radio-otdel MGSPS. Samtempe estus tre bone se k-doj skribus pri stato de laborista radio-telefona movado en sia lando, pri ebleco por laboristo akiri radioakceptilon kaj pri la sistemoj de tiuj akceptiloj. Tiu materialo estos uzita en la eldonata de MGSPS laborista radiorevuo, regule presanta resumojn de siaj artikoloj en esp-o. Samtempe niaj SAT-kamaradoj refoje pruvus pri praktika valoro de nia lingvo kaj de nia SAT-aparato, interliginte laboristajn radiorondetojn en Sovetio kun tiaj en aliaj landoj.

Proksimas al evidente sukcesa fino traktadoj kun Popola Komisario de Poŝtoj kaj Telegrafoj pri ĉiusemajna esperantlingva radioparalado per la potenca Moskva radiostacio je la nomo de Komintern. Ni esperas ke dum tiuj radioparoladoj ni sukcesos ankaŭ propagandi SAT per raportoj pri ĝia laboro kaj ĝia servado al ĉiulandaj proletoj. Sed tio certagrade dependas de tio, kiom niaj kamaradoj montros sian vivemon kaj aktivecon en informado de MGSPS pri rezulto de ĝia provo.

G. Dem.

Presistoj!

“Tallina Presista Unuiĝo decidis aranĝi dum la nuna somero ekspozicion de preslaboroj[1]), kiu estu grandioza kaj ebligu pririgardon de plej bonaj laboroj el diversaj landoj. Tial la estraro de Presista Asocio de Estonio turnas sin al la eksterlandaj kamaradoj kaj petas sendi kolektojn, same adresojn, de kie ni povu ricevi tiajn preslaborojn. Se oni postulos, ni resendos al la sendintoj la ricevitajojn nedifektite.

Oni povas skribi esperante, estone, france, angle, germane kaj ruse. Adreso: *Presista Asocio de Estonio. Rüütli 15—4. Tallinn. Estonio.*

Atendante komplezon de la eksterlandaj kamaradoj

Presista Asocio de Estonio.“

Tiel tekstas esp-lingva alvoko en la estonia presista gazeto “Trükitööline“ n-o 7 (“Presisto“). Unua teksto aperis en n-o 6. Tie estis priskribataj la fonda kunveno de Esp-Fako ĉe Tallinna Presista Unuiĝo kaj longeta alvoko por la eksterlandaj Presistaj Unuiĝoj, ke ankaŭ ili sekvu aŭ imitu Tall. Pres. Unuiĝon kaj fondu Esp.-Fakojn.

Tuj post fondo de la Esp.-Fako estis aranĝata esp.-kurso. Entute enskribiĝis 23 presistoj.

Nun kelkajn karakterizajn vortojn pri rilatoj inter esperanto kaj estonia presistaro. Lastsomere okazis IV. Tutestonia Presista Kongreso en Tallinn kaj ĝi postulis, ke: “en la lernejoj estu instruata esperanto anstataŭ religio“. Entute oni povas rimarki ĉe la presistaro grandan simpation por esp. Kaj nun iom post iom la Pres. Asocio ĝin uzas jam praktike. Imitu!

Kaj nun estas nia devo, ke ni esperantistoj-presistoj helpu kaj montru ĉiamaniere, ke la espero de Pres. Asocio je esperanto ne estas vana. Nun estas bona okazo. Ĉiuj, kiuj volas, ke la ekspozicio estu efektive grandioza, estas petataj sendi diversajn preslaborojn aŭ almenaŭ adresojn, de kie la Asocio povu ilin ricevi.

Presistoj, montru utilecon kaj servemon de esperanto!

Joto.

1) Ĉiuj esperantaj, same ankaŭ nacilingvaj presistaj aŭ aliaj gazetoj estas petataj represi la alvokon! Traduku por nacilingvaj gazetoj!
Presista Asocio de Estonio.

Presejo: UNS-PRODUKTIVGENOSSENSCHAFT, LEIPZIG